Eŭska Lingvo (n-ro 5, paĝoj 1 - 3), aŭ Sergio Pérez-Espejo, de la hispania ministerio pri eksterlandaj aferoj en Madrido (n-ro 5, paĝoj 4 kaj 5) aŭ Hans Dirks pri la situacio de la platdiĉa lingvo (n-ro 5, paĝo 12) aŭ la german-naciisto Franz Stourac de la Karintia Hejmlanda Servo (n-ro 9, paĝoj 2 kaj 3).

* La relativa ofteco de kontribuaĵoj pri Katalunio kaj Eŭskio en tiuj ĉi numeroj klarigeblas per la fakto ke mi proksimiĝis al la temo de etnaj minoritatoj per rekta, surloka spertado de tiukampaj problemoj de katalunoj kaj eŭskoj dum la diktatura reĝimo de *Francisco Franco y Bahamonde*, pri kio iom legeblas en diversaj numeroj.

Pro la komence menciita kaŭzo, ne eblis fotokopii aŭ skani ĉiujn numerojn kaj tial, bedaŭrinde por mi, necesis retajpi numerojn 1 ĝis 8, kio rezultigis, feliĉe por la legantoj, pli bonan legeblecon de tiuj numeroj kompare kun la skanitaj 9 kaj 10. En la retajpitaj numeroj mi klopodis iel kaj iom imiti la originalon plejeble respektante la enhavon kaj strukturon de ĉiu paĝo.

Kelkajn tajperarojn de la originalo mi sukcesis elimini, dum probable - bonvole indulgu tion ĉi - novaj misaĵoj entekstiĝis.

En la "junaĝo" de ***Etnismo***, dokumentita per tiu ĉi reeldono, mi tute ne kuraĝis profeti ĝian estonton kaj ne imagis ke ĝi ankoraŭ ekzistos en la jaro 2008. Plej sincere mi dankas la (longtempajn) gelegantojn pro la daŭra fideleco. Post mia retiriĝo el la redaktado kaj eldonado en la jaro 2003, la revuo ricevis novan, nediskuteble pli belan aspekton, kaj la enhavo restas principe samnivela aŭ eĉ atingis pli altan gradon.

Se vi deziras akiri iun el la numeroj 11 - 73, parte ankoraŭ disponeblaj originale kaj ĉiukaze reprodukteblaj fotokopie aŭ skane, turnu vin al mi. Se vi interesiĝas pri la postaj numeroj, bonvolu turni vin rekte al la nuna redaktorino de la revuo:

s-ino Nicole Margot, chemin des Lys 4, CH - 1010 Lausanne.

Uwe Joachim Moritz